# Aŭstraliaj Esperantistoj

## Novaĵletero de ĉiuj Aŭstraliaj Esperantistoj

**RETADRESE AL ĈIU ESPERANTISTO EN AŬSTRALIO, NOVZELANDO KAJ PETANTOJ**

**Redaktoro Roger Springer Provlegita de Franciska Toubale**



**PLENUMITA 02/06/2022 Kvincentokdekkvina eldono (unua eldono 20/09/2011)**



## Subtenu vian Novaĵleteron

Sendu novaĵojn, leterojn, fotojn, informojn al Roger Springer rogerspringer@tpg.com.au;

**La limdato por sendi kontribuaĵon al AE estas mardo en la vespero. Merkredo estas tro malfrua .**

Alternativaj Novaĵoj https://www.greenvillepost.com/ https://titaniclifeboatacademy.org/ https://thesaker.is/

***Uzindaj ligoj*** *Google Translate* *Plena Ilustrita Vortaro* *Freelang Vortaro* *lingvohelpilo* *PMEGramatiko* *esperanta retradio* *Plena Analiza Gramatiko*


*Pasintaj AE eldonoj* *Esperanta himno* *duolingo entute* *openclipart.*

**Pasintaj „Aŭstraliaj Esperantistoj“ korektitaj atingeblas je la suba adreso**

Ctrl+klaku la veran ligilon) http://aea.esperanto.org.au/australiaj-esperantistoj/?lang=eo

Ĉirkaŭ unu semajnon post la ĝenerala elsendo, la korektitaj kopioj estas sendataj al AEA. (Sen #)

## Entute 725,000 lernantoj nun studas Esperanton per Duolingo



Nun studas 300,000 lernantoj per la angla lingvo. (Ekde Majo 2015)

Nun studas 173,000 lernantoj per la hispana lingvo. (Ekde Oktobro 2016)

Nun studas 152,000 lernantoj per la portugala lingvo. (Ekde Majo 2018)

Nun studas 100,000 lernantoj per la franca lingvo. (Ekde julio 2020 )

Nun preparas Esperantan programon por ĉinoj. (Ekde 2022 ?? ???)

## Surhavu vizaĝmaskon.

*Roger Springer*



**Unu terno povas elŝpruci virusojn ĝis 8 metroj.**

**Homoj protektas aliulojn per la surporto de vizaĝmaskoj.** Nun oni kredas ke aeraj gutetoj estas la ĉefa maniero, per kiu homoj infektiĝas je la kronviruso. Vi respondas pri via sano, do portu maskojn.

Ĉu kapitulaco ne povas savi viajn vivojn, familiojn, domojn, urbojn, dignojn kip *Roger Springer*



la [esperanta retradio](#)



Donas Bonan Cirkaŭ-5 Minutan Aŭskultadon kaj Legadon Ĉiun Tagon.

OLIVOLEO POVAS PLILONGIGI LA VIVON
28A MAJO 2022

*(Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*



**EKSTRAĴOJ POR LECIONOJ DE "THE ESPERANTO-TEACHER" (de Mason Stuttard). Numero 17 de "Por Progresantoj".**

**GRAMATIKAJ KVIZETOJ: Respondu al la jenaj gramatikaj demandoj:**

1).Ĉu "aŭ" kaj "eŭ" estas diftongoj aŭ ĉu oni ankaŭ rajtas nomi ilin "kombinaĵo de du vokaloj"?
2).Ĉu "aŭ" kaj "eŭ" estas la nuraj diftongoj en Esperanto?
3).Ĉu la tabelvortoj estas ordinaraj vortoj? Se jes aŭ se ne, kial?
4).Ĉu ekzistas tabelvortoj en la angla lingvo? Se jes, kiuj?
5).Ĉu inter du epitetoj devas troviĝi konjunkcio? Donu ekzemplon de ĉiu kazo.
6).Kiun signifon havas la unua "o" en la vorto "urbodomo"?

Vi trovos la solvojn de la kvizetoj ĉe la fino de ĉi tiu gazeto A.E. n.ro 585 *Marcel Leereveld.*



# La Manlia Esperanto-Klubo



La Manlia grupo kunvenas je 10.30 atm ĝis 12ptm la unuan kaj trian sabatojn de la monato Unu taso da klubpagita kafo atendos vin.
Ni renkontiĝas ĉe la oceana fronto kontraŭ la Restoracio Whitewater, Suda Stejno.
La 04a de junio estos la unua sabato Venu !

*Roger Springer*

# Feliĉan datrevenon de via naskiĝtago 2022-05-22

Saluton Roger, el fora Anglio. Ĝojigas min aldoni miajn bondezirojn al ĉiuj aliaj esperantistoj aŭstraliaj por gratuli vin je via 91a naskiĝdatreveno. Mi kaptas la okazon ankaŭ danki vin je daŭra sendo de la novaĵmesaĝo, Aŭstraliaj Esperantistoj. Ĝi ĉiam feliĉigas min pro novaĵoj de miaj subaj amikoj kaj ties aktivaĵoj.



Amikajn bondezirojn je via longa kaj fruktodona vivo.
Espereble vi daŭre ĝuos bonan sanon kaj pacon.

*Jennifer Bishop*

# El Adelajdo



Elkorajn naskiĝtag-gratulojn al vi el Adelajdo!
Restu ankoraŭ longe sana, plena de energio kaj optimismo. Ni kalkulas je vi!

Amike, *Katja Steele*

(*Marcel naskiĝis 4-an de Decembro 1917*



# M i a v i v o n u m e r o 11.

Dum multaj jaroj efektis sur min, kaj sur aliajn, kelkaj malagrablaj okazoj en miaj unuaj jaroj de infaneco.

Unue mi menciu kio okazis iun tagon en amsterdama fabriko. Tie oni estis akceptinta junan lernoservanton. Li havis personan problemeton: li ne facile povis feki kaj eligis regule malbonan aeron. La laboristoj ne ŝatis tion, kaj unu tagon iu el ili proponis, kiel ŝercon, elsuĉi la fekaĵon el lia ventro per polvosuĉilo. Do ili perforte prenis lin kaj metis la suĉilon sur lian anuson. La fekaĵo elvenis, sed la suĉilo estis tiom forta, ke ĝi elsuĉis ankaŭ liajn intestojn kaj eĉ ĉiujn aliajn organojn. La ŝerco misis, kaj escepte de lia cerbo lia korpo estis tute malplena. Post nelonge, kun terura doloro, li mortis. Poste en krimula kazo la laboristoj ne volis doni la nomon de tiu kiu unue proponis la "ŝercon", kaj la juĝisto do donis la malliberejan punon al ĉiuj.

Alia kazo de morto okazis tiutempe en la nederlanda provinco Frislando, kie iu farmisto forsendis sian edzinon kaj vivadis kun juna virino de li amata. Ne la edzino, sed la registaro decidis perforte kapti la amatinon kaj sendis kvar policanojn por tio. Sed la farmisto simple mortpafis ilin, kaj poste sin mem. Farmistoj en Nederlando rajtas havi pafilojn. La amatino kaj la edzino pluvivis.

Dum tiu tempo tuj post la unua mondmilito multaj nacioj havis demokratan parlamenton, konsistantan el ĉiaj specoj de politikaj konvinkoj. La dekstraj entenis i.a. faŝismajn kaj tre konservemajn kapitalismemajn grupojn, ĉiam malgrandajn, kaj la maldekstraj i.a. la t.n. komunistojn, nur kelkfoje sufiĉe grandajn. En la mezo estis la normale grandaj Konservatuloj kaj la socialdemokrataj ("*Labour*") partioj. Normale AŬ la dekstra AŬ la maldekstra flanko regis la parlamenton, do la nacion. Sed ili timis la ekstremulojn. Tio okazis en Germanujo, parte pro la populareco de la marksisme komunista Rosa Luxemburg, kun la gefratoj Liebknecht. Do la demokrateca germana registaro sekrete mortigis Rosa. Tio kaŭzis gravan timon en la eŭropaj kaj nordamerikaj landoj, kie oni en la sekvantaj jaroj daŭre diskutis la aferon publike. *Marcel Leereveld.*



Okazaĵo por honori la vivon de aktivulo *Hazel Green* de *Toowoomba* kaj de *Oakey,* okazos ĉe Lake Annand Park, Toowoomba de 10:00 ĝis 4:00 p.m. dimanĉon la 5-an de junio 2022.

Hazel Green (Verda) estis Verda laŭ nomo kaj verda laŭ naturo. Ŝi dediĉis sin al la plibonigo de nia mondo kaj precipe al nia loka komunumo. Ŝi fervore rekomendis la Internacian Lingvon, Esperanto, vidante ĝin kiel solvon de la komunikadbaroj kiuj rezultigis konfliktojn. Ŝi mortis 5an Sept 2021 *Petro Danzer*



La sukceso de milito dependas de kiuj mortigis la plej multajn homojn. Mi kredas ke soldatoj estas homoj ne peonoj. Detruitaj militaj aviadiloj ktp ankaŭ enhavas homojn Mi scias ke la plej multaj soldatiĝis pro la salajro, ne por militi. Devigitaj soldatoj estas peonoj. *Roger Springer*
Tre malmultaj ŝatas la eblecon ĉasi kaj mortigi homojn. Bedaŭrinde tiuj estas la herooj dum milito.

# La estonteco

Verŝajne iu faris demandojn al la fondinto de Dubai pri la estonteco de lia lando. Lia respondo: "Mia avo rajdis kamelon, mia patro rajdis kamelon, mi veturas per Mercedes, mia filo per *Landrover* kaj mia nepo ankaŭ per *Landrover*. Sed mia pranepo devos ree rajdi kamelon."

"Kial?" oni demandis, kaj la ŝejko respondis: "Malfacilaj tempoj kreas fortajn virojn. Fortaj viroj kreas pli facilajn tempojn. Facilaj kondiĉoj kreas malfortajn virojn, kaj malfortaj viroj malfacilajn tempojn. Multaj tion ne komprenas, sed necesas bredi fortulojn, ne parazitojn. Aldone, la historio montras, ke ĉiuj grandiozaj imperioj - la greka, la roma, la brita - ĉiuj leviĝis kaj pereis en la daŭro de 240 jaroj. Ili ne estis konkeritaj de ekstere; ili putris interne. Usono nun superis tiujn 240 jarojn - kaj la putro komenciĝas esti videbla kaj akcela. Kaj ne nur en Usono, sed ankaŭ en la tuta Okcidenta Mondo. Jam forpasis la jaroj de *Mercedes* kaj *Landrover*...jes, la kameloj videblas sur la horizonto."

Tamen, ĉu eblas, ke en nia propra lando nun post la Elekto estas espero? Tiom da junaj homoj (precipe inaj!) plenplenaj je bonaj intencoj, elektiĝis. Ni esperu, ke ili kaj nia nova registaro povas efektivigi almenaŭ la komencon de la ŝanĝoj kiujn kaj Aŭstralio kaj la cetero de la mondo tiom grande bezonas.

*Vera Payne*



**3ZZZ**...... Alvenis vintro, do la tempo por sidi apud la fajro, auskulti nian radio-programon aŭ komforte legi libron! la elsendo de la 30a de majo 2022 enhavas recenzon de pluraj libroj

*Franciska Toubale*

# SOLVOJ DE LA KVIZETOJ:

1), Oni ne povas nomi ilin kombinaĵoj de vokaloj, ĉar oficiale "ŭ" ne estas vokalo.
2). Kelkaj esperantologoj faras eraron nomante "oj" diftongon, malĝuste ĉar "oj" jam estas necesa vortfinaĵo.
3). Tabelvortoj estas de Zamenhof speciale kreitaj vortoj sen vortspecaj finaĵoj. Ili povas ricevi vortspecajn finaĵojn, kiel en "tioa; tiae; tiea; tieso; tioma; tialo; tiama".
4). Jes, ekzemple: *who; what; how; where; when*.
5). Ne, ekz. "La granda amerika arbo; La granda arbo amerika; La tiea lago profunda; La festo sukcesa tiama".
6). Ĝi estas nur ornamaĵo, kaj havas neniun signifon. Konsekvence "urbodomo" kaj "urbdomo" signifas ekzakte la samon.

*Marcel Leereveld.*

Mi neniam komprenas kial beboj suĉas siajn dikajn fingrojn. Sed ekde kiam mi gustumis bebomanĝaĵon, mi ne plu miras!"

*Bob Felby*

